



Strategia plano
de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
por la jaroj 2014-2017

*Kunverkis la Estraro de TEJO, sub gvido de Łukasz
Żebrowski, Prezidanto de TEJO, surbaze de la kontribuoj
de Komitatanoj kaj Individuaj Membroj*

Akceptita kaj amendita de la Komitato de TEJO

ENKONDUKO

Jen ni prezentas al vi la trijaran strategian planon de TEJO. Ĉi tiu estas la unua tiaspeca dokumento pretigita de TEJO, ĉar ĝis nun ni kutimis labori nur per unujaraj laborplanoj.

La strategia plano estas dividita je 4 agadkampoj: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigo, konataj jam de la trijara Strategio de UEA. Ĉi tiu divido estas novaĵo en TEJO, ĉar ĝis nun niaj laborplanaj dokumentoj ĉiam estis dividitaj laŭ la estraraj respondeckampoj. Tia rigardo al la planoj permesos pri tutaĵe rigardi al la evoluo de TEJO ol nur enkomisione realigi planitajn aferojn. Nenova estas tamen la SMART-eco de la celoj, kiuj estis aplikitaj ankaŭ jam antaŭe. Temas pri tio, ke la celoj en la Strategio de TEJO estu **specifaj, mezureblaj, ambiciaj, realigeblaj kaj templimigitaj**. Kompreneble per tio ĉi, same kiel antaŭe, la celo estas ke la planoj estu reale plenumitaj kaj nepre ne estu nur senenhavaj rondfrazoj.

Ĉar la planoj kovras tutan terenon de la agado de TEJO espereble ĉiuj, kiuj almenaŭ trarigardos ĉi tiun strategion rapide trovos tiujn celojn al kies realigo ili ŝatus kontribui. Kaj al tio vi ĉiuj estas varme invititaj, ĉar ĝuste interalie de vi, kara leganto, dependas ĉu ni kune sukcesos realigi tion kion ni ĉi tie planis. Ne hezitu do, partoprenu!

Łukasz Żebrowski

Prezidanto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

ENHAVLISTO

AGADKAMPO 1: KONSCIIGO

- [1.1. Kvalita plurlingva alekstera informado de TEJO](#)
 - [1.1.1. Provizi ilojn \(materialojn kaj sciojn\) al aktivuloj por engaĝi komencantojn](#)
 - [1.1.2. Atingi ke la retpaĝo de TEJO iĝu taŭga reta informilo por ne-esperantistoj](#)
- [1.2. Porti Esperanton al internacia superŝtata organizo](#)
- [1.3. Plidensigi eksterrilatajn agadojn ekster Eŭropo](#)

AGADKAMPO 2: KAPABLIGO

- [2.1. Liveri kursgvidantojn al landoj sen TEJO-sekcioj aŭ kun malfortaj sekcioj](#)
- [2.2. Trejni internacie E-aktivulojn](#)
- [2.3. Enigi kaj subteni Esperanton en famajn vastuzatajn lingvoinstruajn retejojn](#)
- [2.4. Organizati kaj pli fluigi la engaĝiĝon en TEJO](#)

AGADKAMPO 3: KOMUNUMO

- [3.1. Havi tutmondan agadon pli viglan](#)
 - [3.1.1. Mondregionaj komisionoj/oficejoj](#)
 - [3.1.2. Reprezento de TEJO en eventoj organizitaj de LS-j de TEJO](#)
 - [3.1.3. IJK en Afriko en 2017](#)
- [3.2. Liveri kulturon al la komunumo de TEJO](#)
 - [3.2.1. Okazigi kultur-movadan programon en ĉiu IJK](#)
 - [3.2.2. Krei viglan retpaĝeron pri kulturo – TEJO havu gvidan rolon en la organizado de la kultura vivo](#)
 - [3.2.3. Krei poŝtelefonan aplikaĵon de TEJO/Kontakto](#)
 - [3.2.4. Faka agado – havi pli da fakaj sekcioj kaj por tio krei ŝablonon de regularo por faka sekcio, helpi por krei fakajn sekciojn](#)
- [3.3. Igi la komunuman agadon de TEJO pli interaga](#)
 - [3.3.1. Strukturigi agadon de TEJO en sociaj retejoj kiel Facebook aŭ Twitter](#)
 - [3.3.2. Instigi menciigon de TEJO en nova Lernu!-kurso kaj krei ligeblojn al TEJO de Lernu!](#)
 - [3.3.3. Informado ene de TEJO](#)
 - [3.3.4. Pasporta Servo](#)

AGADKAMPO 4: KUNORDIGO

- [4.1. Havi efikan scitransdonon kaj daŭripovan mastrumadon](#)
- [4.2. Havi kreskantan aktivularon de TEJO](#)
 - [4.2.1. Kreskigi nombron de aktivuloj en komisionoj almenaŭ ĝis 150](#)
 - [4.2.2. Nombri funkciajn universitatajn Esperanto-grupojn kaj sekve kreskigi la nombron je 20%](#)
 - [4.2.3. Nombri funkciajn junularajn lokajn Esperanto-grupojn kaj sekve kreskigi la nombron je 20%](#)
- [4.3. Havi pli koheran administradon en TEJO](#)
 - [4.3.1. Havigi al LS-j mastrumadsistemon pri siaj membroj](#)
 - [4.3.2. Membroj de LS-j iĝu konsciaj membroj de TEJO](#)
 - [4.3.3. Projektbazita subtenpetado inter Esperantistoj](#)

AGADKAMPO 1: KONSCIIGO

1.1. Kvalita plurlingva alekstera informado de TEJO

1.1.1. Provizi ilojn (materialojn kaj sciojn) al aktivuloj por engaĝi komencantojn

Priskribo

Krei materialojn por varbado de komencantoj kaj kapabligi aktivulojn por taŭge varbi, varti, informi kaj engaĝi ilin.

Agadoj

- Kolekti anekdotojn pri bonaj spertoj kaj historiojn pri engaĝado de novuloj.
- Krei manlibron pri engaĝado de komencantoj ĝis fino de 2015.
- Krei gvidliniojn pri novula programo ĝis novembro 2015.
- Organizi adoleskan programon kadre de junularaj aranĝoj (IJK, Junulara E-Semajno kaj aliaj) kaj sekve gvidlinion pri ties organizo.
- Organizi almenaŭ du trejnadojn pri la temoj rilataj al alekstera informado (ekzemple pri verkado de varbiloj k.s.). Retajn ĝis decembro 2015, ĉeestajn ĝis decembro 2016.
- Krei mojosajn filmetojn pri la junulara Esperanto-movado kaj ĝiaj celoj ĝis oktobro 2016.
- Enpaĝigi la TEJO-informilon en la lingvoj al kiuj ĝi estis tradukita ĝis decembro 2015.
- Traduki la TEJO-informilon en la lingvojn de la landoj de niaj LS-oj, de la ontaj eksteraj eventoj kaj de la landoj kie oni laboras por starigo de LS.
- Krei kun ILEI kaj UEA stokejon de kvalitaj informiloj kaj varbiloj ĝis marto 2017.

Atendataj rezultoj

- Kreskanta membraro por niaj LS-j (sume kaj por du trionoj el ili).
- Kreskanta integriĝo kaj engaĝiĝo de adoleskuloj.
- 50 homoj kiuj finos ambaŭ menciitajn rettrejnadojn.
- Almenaŭ 30 homoj jare el almenaŭ 4 landoj trejnitaj pri persvadteknikoj kaj 30 pri kreado de varbiloj.
- Almenaŭ du trejnadoj jare pri respektive persvadteknikoj kaj kreado de varbiloj.
- Provizado de LS-j de TEJO per la informiloj en ties naciaj lingvoj (en elektronika formo).

1.1.2. Atingi ke la retpaĝo de TEJO iĝu taŭga reta informilo por ne-esperantistoj

Priskribo

La retpaĝo de TEJO estu taŭga informilo por neesperantistoj laŭ lingvoj kaj enhavo, do ĝi estu plurlingva kaj ankaŭ havu apartajn paĝojn pri Esperanto, por ne-Esperantistoj.

Agadoj

- Krei liston de paĝoj, kiuj estas tradukendaj (kun diversaj prioritatoj).

- Krei kelkajn paĝojn por ne-esperantistoj (interalie “oftajn demandojn”) ĝis septembro 2015.
- Traduki la retpaĝon de TEJO. 5-10 lingvoj pretu ĝis junio 2015 (prioritataj partoj ĝis marto 2015), aliaj 5 lingvoj pretu ĉiun jaron.
- Havi kategorion de novaĵoj ĉe tejo.org (ĉu nova formo de Dialog’?) por kelkfoje aperigi Esperanto-rilatajn novaĵojn kun ekstermovada signifo kaj ĉefajn bonajn novaĵojn pri TEJO.
- Havi ĝisdatan subpaĝon pri eventoj de LS-j.

Atendataj rezultoj

- La retpaĝo (ampleksa versio por neesperantistoj) de TEJO estos tradukita almenaŭ al la UN-lingvoj.
- La retpaĝo (sinteza versio por neesperantistoj) pretu en almenaŭ 10 aliaj lingvoj.
- Neesperantistoj vizitu retpaĝon de TEJO.

1.2. Porti Esperanton al internacia superŝtata organizo

Priskribo

Konsiderigi la lingvan problemon kaj la rolon kiun povas ludi Esperanto en ĝia solvo al internacia superŝtata organizo, kiel ekzemple Eŭropa Unio.

Agadoj

- Kontaktiĝi kadre de eksteraj eventoj kun junularpolitikaktivaj organizoj.
- Aktivigo de esperantistoj aŭ esperantemaj homoj en tiuj medioj.
- Partopreno de TEJO-membroj en ties eventoj per lingvopolitikaj programeroj.
- Subvencipeti al publikaj kaj privataj kulturcelaj (ekz. bankaj fondaĵoj, rotario) instancoj por kulturaj kaj lingvopolitikaj eventoj, relative proksime al balotoj (kaj cele al invito de junaj kandidatoj).
- Kontaktigi per taŭgaj homoj (ekzemple per jamaj kontaktoj), gravulojn kun forta influo al la junulara publiko kaj kiuj ne montris fermemon.

Atendataj rezultoj

- Sukcesi 3 temajn renkontiĝojn kun gvidantoj de internaciaj organizoj aŭ eŭropaj parlamentanoj ĝis fino de 2016.
- Sukcesi havi esperantfavoran deklaron de almenaŭ 3 internaciaj neregistaraj organizoj aŭ junularaj politikpartioj, ĝis fino de 2017.
- Almenaŭ unu internacia superŝtata organizo diskutu la lingvan problemon, enkonsiderante Esperanton, ĝis fino de 2017.

1.3. Plidensigi eksterrilatajn agadojn ekster Eŭropo

Priskribo

Partoprenigi homojn al eksterrilataj agadoj en almenaŭ 4 kontinentoj, stabiligi la partoprenon de TEJO en almenaŭ 3 mondregionaj junularaj organizaroj.

Agadoj

- Almenaŭ 4-foje jare varbi pri eksterrilata agado kaj tiel logi al ĝi lertajn junulojn el ĉiuj mondopartoj pere de montrado de eblecoj, jamaj sukcesoj kaj ĝisdatigo de trejnado pri eksteraj rilatoj.
- La ĉeestan trejnadmaterialon por eksteraj rilatoj de TEJO ĉiujare en novembro adapti laŭ la novaj bezonoj.
- Stabiligi kaj plifortigi la jam komencitajn kunlaborojn, pere de partopreno en eventoj kaj agadoj, rete kaj ĉeeste.
- Ekhavi retan kontakton de aliaj tutmondaj junularaj organizaroj.
- Ĝis la fino de 2015 havi kvinjaran strategion por ĉiuj instancoj, kun kiuj TEJO kunlaboras kaj havi unuopajn respondeculojn por ĉiuj instancoj ĝis IJK 2016.
- Ĉiujare en septembro esplori eblojn kaj indecon de membreco de TEJO en diversaj organizoj, en kiuj TEJO ne jam membras.
- Prezenti kandidatiĝon de TEJO al tiuj organizoj, en kiuj la membreco de TEJO indas ene de 4 monatoj post la interkonsento pri indeco kaj ebleco membriĝi.

Atendataj rezultoj

- Almenaŭ 30 homoj el 3 kontinentoj partoprenos eksterrilatan agadon dum ĉiu jaro, el kiuj por almenaŭ 5 estos unua partopreno.
- TEJO membru en almenaŭ 3 internaciaj junularaj organizaroj, kaj membroj de TEJO aktivu en almenaŭ 5 junularaj organizoj gravaj por TEJO.

AGADKAMPO 2: KAPABLIGO

2.1. Liveri kursgvidantojn al landoj sen TEJO-sekcioj aŭ kun malfortaj sekcioj

Priskribo

Okazigi intensajn Esperanto-kursojn en landoj sen forta junulara movado, venigante spertajn (junajn) instruistojn en oportuna maniero, ekz. el proksima lando.

Agadoj

- Listigi kapablajn, profesiajn kaj prezentebajn lingvoinstruistojn ĝis decembro 2015
- Instigi la nunajn aktivulojn kun sufiĉa lingvokono kaj instrukapablo organizi kursojn en sia nuna medio.
- Aranĝi instruistajn trejnadojn dum junularaj eventoj, almenaŭ po 2 ĉiujare ekde 2016, en diversaj mondopartoj.
- Kunlabori kun edukado.net, ILEI kaj UEA por starigo de reteja "kurs-bazaro" kie registru sin kursgvidantoj unuflanke kaj kurs-dezirantoj aliflanke ĝis fino de 2015.
- Certigi rimedojn (ekzemple kun UEA/ILEI) por vojaĝigi kursgvidantojn al lokoj strategie gravaj por TEJO aŭ por la movado kie mankas kursgvidantoj. La sistemo ekfunkciu antaŭ la fino de 2016.
- Krei skemon de facile organizebla malgranda, semajnfina pornovula renkontiĝo ĝis marto 2016. Konsulti kun almenaŭ tri LS-j ĝis septembro 2016. Elprovi ĝin ĝis la fino de 2016.

Atendataj rezultoj

Koni la plej taŭgajn, malmultkostajn kaj prezentebajn instruistojn, kiujn oni povas sendi al tiaj kursoj. Havi junajn instruistojn kun instruspertoj en almenaŭ 5 kontinentoj. Okazu almenaŭ 3 malgrandaj renkontiĝoj en almenaŭ 4 kontinentoj ĉiun jaron.

2.2. Trejni internacie E-aktivulojn

Priskribo

Trejnado de aktivuloj devas esti regula agado de TEJO. La plej facila kaj efika maniero organizi aktivulajn trejnadojn estas kadre de internaciaj eventoj. TEJO devas strebi kunlabore kun landaj sekcioj subvencipeti kaj kunorganizi tie aktivulajn trejnadojn.

Agadoj

- Difini temojn kaj agadkampojn pri kiuj necesas fari trejnadon por specifaj mondregionoj (ĝis oktobro 2015).
- Organizi trejnseminariojn en la plej grandaj Esperanto-aranĝoj subvencipetante por ili kunlabore kun la organiza teamo/landa asocio.
- Subvencipeti en Eŭropo por projektoj kiuj subtenas partneradon kun eŭropaj kaj eksteŭropaj organizoj.
- Aranĝi trejnadojn dum IJK.

- Kreadi retajn trejnadojn.
- Enretigadi materialojn de ĉeestaj trejnadaj en formo uzebla por memlernado.

Atendataj rezultoj

- Subvencioj ricevitaj por la partopreno de homoj al aktivula trejnado.
- Trejniĝu rete almenaŭ 200 homoj.
- Trejniĝu ĉeeste almenaŭ 200 homoj.

2.3. Enigi kaj subteni Esperanton en famajn vastuzatajn lingvoinstruajn retejojn

Priskribo

Esplori kiuj estas la plej famaj lingvoinstruaj retejoj kaj laŭeble aldoni Esperanton kiel cela aŭ pera lingvo kun kunlaboro de esperantlingvaj uzantoj.

Agadoj

- Kunlaboro kun Duolingo
Kontakti Duolingo ĝis la fino de decembro 2014 pri ebla kunlaboro kun TEJO, kaj proponi donacojn de TEJO por homoj, kiuj atingas certajn lingvonivelojn, cele al regula kontakto kun TEJO kaj konscio pri ties ekzisto.
- Subteni kreiĝojn de plurlingvaj kursoj de Esperanto ĉe Duolingo
Varbi por la kreiĝantaj kursoj en Duolingo, ĉu por havi pli da partoprenantoj, ĉu por havi pli da kurskreatoj. Celo: la kurso de Esperanto ĉe Duolingo ekzistu, se Duolingo permesas, en 10 lingvoj ĝis la fino de 2015, en 15 lingvoj ĝis la fino de 2016, kaj en 20 lingvoj ĝis la fino de 2017.
- Kunlaboro kun lernu.net
Ampleksigi kunlaboron kun lernu.net por proponi al la ties kursanoj aktiviĝon en TEJO. Tio funkcii laŭeble ĝis la fino de 2015.
- Kolektado kaj diskonigado de ekzistantaj modernaj instruiloj
Ĉiujare en februaro kolekti modernajn kurs-instruilojn faritajn por instrui Esperanton (aŭ facile adapteblajn) kiuj reuzeblas kaj kopieblas al pluraj lingvoj. Ordigi ilin, varbi pri ili kaj alvoki entuziasmojn kiuj volas reuzi ilin aŭ kunlabori pri plurlingvigo.
- Kunlaboro kun aliaj lingvoinstruaj retejoj
Ĉiujare en aprilo kolekti informojn pri ekzistantaj lingvolernaj retejoj, kiuj ankoraŭ ne enhavas Esperanton. En majo kontakti ilin cele al enigo de Esperanto.

Atendataj rezultoj

Havi Esperanton inter la kutime haveblaj lingvoj de popularaj lingvoinstruaj retejoj kaj videbligi Esperanton kaj ĝian vivecon en tiu maniero.

2.4. Organizati kaj pli fluigi la engaĝiĝon en TEJO

Priskribo

Junuloj havu la bezonatajn informojn por povi engaĝiĝi en TEJO. Por tio necesas krei por pluraj kampoj enkondukon kaj trejnadon, ekzemple kiel nun estas por komisionoj aŭ la reta trejnado pri eksteraj rilatoj.

Agadoj

- Konsciigi (pere de varbado, ĉiumonata mencio) la engaĝiĝeblojn en TEJO.
- Informi pri taskoj kaj agadoj de TEJO, al kiuj je nacia nivelo ne estas similaj taskoj.
- Informi almenaŭ ĉiun trian monaton tra la kutimaj kanaloj de TEJO pri la aktuale farendaj taskoj.
- Konsciigi (pere de varbado, ĉiumonata mencio) la kunordigan, helpan rolon de TEJO en la junulara movado.
- Kun la aktiva engaĝiĝo de la komisiongvidantoj kaj respondecaj estraranoj krei enkondukajn rettrejnadojn aŭ priskribojn por ĉiuj kampoj, kie oni laboras en komisionoj.

Atendataj rezultoj

Pli da taskoj faritaj, pli da junuloj engaĝitaj.

AGADKAMPO 3: KOMUNUMO

3.1. Havi tutmondan agadon pli viglan

3.1.1. Mondregionaj komisionoj/oficejoj

Priskribo

Regionigi la agadon de TEJO per ekfunkciado de lokaj komisionoj aŭ oficejoj de TEJO por kunordigi la junularan movadon en aliaj kontinentoj. Nomumi landagadajn komisiitojn.

Agadoj

- Nomumi komisiiton de TEJO en ĉiu kontinento ĝis la fino de 2015.
- Krei regionajn komisionojn en ĉiu kontinento, cele al memstara eklaboro de kroma regiona komisiono ĉiujn 6 monatojn ĝis aktiviĝo de ĉiuj 5.
- Krei regionan oficejon (aŭ alian strukturon) kie tio necesas, ekzemple por eksterrilataj aŭ subvenciaj kialoj.

Atendataj rezultoj

- Almenaŭ 2 novaj LS-j jare naskitaj post perado de la regiona komisiono.
- Nevakeco de regionaj komisiitoj.
- Agado de homoj el almenaŭ 3 landoj en ĉiu el almenaŭ 4 regionaj komisionoj.

3.1.2. Reprezento de TEJO en eventoj organizitaj de LS-j de TEJO

Priskribo

Certigi, ke en ĉiu signifa evento de LS de TEJO estu iu kiu prezentas kaj reprezentas TEJO-n, kolektas membriĝojn kaj simile.

Agadoj

- Kompletigi kaj teni ĝisdata la parton "Eventoj" ĉe la retpaĝo de TEJO.
- Antaŭ la ĉefaj aranĝoj serĉi partoprenonton kiu rolu tie, kiel TEJO-representanto.
- Dum 2015 pretigi prezenton kaj kvizon pri TEJO, kaj ĉiujare ĝisdatigi ĝin.
- Sendi salutvortojn se ne eblas trovi TEJO-representanton.

Atendataj rezultoj

- Reprezentado (ne nepre ĉeesta) de TEJO en ĉiuj LS-eventoj kun almenaŭ 20 partoprenantoj.
- Okazigo de TEJO-memprezentado dum almenaŭ 10 eventoj dum la jaro.
- Almenaŭ 30 individuaj membriĝoj dumeventaj ekster IJK.

3.1.3. IJK en Afriko en 2017

Priskribo

Kunlabore kun ILEI okazigi kongresojn de TEJO kaj ILEI en Afriko en 2017.

Agadoj

- Pretigi laŭeble detalan analizon pri Landa Agado en Afriko ĝis septembro 2015.
- Viziti Burundon kiel eblan kandidaton por IJK ĝis februaro 2015.
- Provi venigi reprezentantojn de la Afrikaj organizantoj al IJK 2015 kaj/aŭ IJK 2016.
- Prezenti konkretan proponon pri la IJK 2017 en Afriko ĝis oktobro 2015.
- En decembro 2015 lanĉo de la kampanjo por financi venigon de Afrikanoj al Afrika IJK kaj por sukcese okazigi la kongreson.
- Organizi trejnkurson por organizantoj de IJK 2017 ĝis aŭgusto 2016.
- Laŭeble okazigi pliajn trejnajn kaj organizajn vizitojn en la dua duono de 2016 kaj unua duono de 2017.

Atendataj rezultoj

- Internacia Junulara Kongreso en Afriko en la jaro 2017 kun vasta partopreno de Afrikaj aktivuloj de TEJO.

3.2. Liveri kulturon al la komunumo de TEJO

3.2.1. Okazigi kultur-movadan programon en ĉiu IJK

Priskribo

Kadre de ĉiu IJK okazu programeroj, kies celo estas proksimigi al junaj esperantistoj la Esperanto-kulturon kaj historion de la Esperanto-movado. Kadre de prelegoj, diskutrondoj, atelieroj, laborkunsidoj kaj kursoj TEJO instigu al interesiĝo pri la kulturaj kaj movadhistoriaj temoj, donu spacon al interkonatiĝo de la personoj kun similaj interesiĝoj kaj enkonduku la novulojn en la Esperanto-komunumon.

En ĉiu IJK okazu:

- programeroj pri la bazaj scioj pri la Esperanto-kulturo kaj historio de la movado - rekomendataj por novuloj kun certa lingvonivelo.
- literaturaj atelieroj - ekz. pri kreiva verkado, poezio.
- libroservo - almenaŭ kun kelkaj bazaj kaj novaj libroj kaj libroj kiuj rilatas al la kulturaj kaj movadaj programeroj okazantaj en la koncerna kongreso.
- prelegoj pri la Esperantaj literaturo, historio kaj movado - parto en formo de kurso.

Agadoj

- kompili proponon pri la kultur-movada programo en IJK, laŭeble reference al kongresa temo - ĝis la fino de la jaro antaŭ la IJK.
- elekti respondeculojn pri la koncernaj partoj de la programo - ĝis la fino de la jaro antaŭ la IJK.
- varbi prelegantojn kaj gvidantojn de programeroj - ĝis la fino de februaro.
- findecidi pri la programo kaj enhavo - ĝis la fino de marto.
- varbi partoprenantojn de la programo (aparte por kursoj) - ekde aprilo.
- kompili libroliston, decidi pri kvantoj kaj ekspedo - ĝis la fino de junio.

Atendataj rezultoj

- Plialtigo de la ĝeneralaj scioj pri la Esperanto-kulturo kaj historio de la Esperanto-movado.
- Interesigo de la partoprenantoj de IJK pri la kulturaj kaj movadaj temoj.

3.2.2. Krei viglan retpaĝeron pri kulturo - TEJO havu gvidan rolon en la organizado de la kultura vivo

Priskribo

Kultura vivo en la junulara movado estas tre vigla. En la retpaĝo de TEJO estu kolekto de la kultura sceno de la Esperanta junularo. Ĝi montru la riĉecon kaj diversecon de la kultura produktado (muzika, literatura, filma, teatra, ktp) en Esperanto kaj fare de esperantistoj.

Agadoj

- kolekti informojn pri kulturaĵoj interesaj por junuloj ĝis marto 2016.
- pretigi retpaĝon kun ligiloj al aliaj paĝoj de gravaj produktantoj kaj kolektantoj de e-kulturaĵoj.
- regule, ĉiumonate rigardi por ĝisdatigi la retpaĝon.

Atendataj rezultoj

Aktuala kaj laŭeble kompleta paĝo pri kultura vivo de Esperanto-junularo.

3.2.3. Krei poŝtelefonan aplikaĵon de TEJO/Kontakto

Priskribo

Krei poŝtelefonan aplikaĵon, kiu liveros aktualajn informojn de TEJO kaj de Esperantujo. Ĝi estu malkomplika, sed certe realigebla, ekz. nur utiligu ekzistantajn RSS-fluojn. La aplikaĵon havu informojn el ĉiuj landaj sekcioj pri la movado, ekzemple 5 novaĵoj monate estu senditaj el ĉiuj landaj sekcioj kaj miksaĵo de ili aperu en la RSS-fluo. Krome, ĉiusemajne almenaŭ unu kultura novaĵo aperu inter la aliaj.

Agadoj

- Krei liston de fontoj de aktualaĵoj kaj funkcioj ĝis aprilo 2016.
- Serĉi programiston, kiu preparos ĝin por Android ĝis septembro 2016.
- Krei testan version de la programo unu monaton post realiganto estos trovita.
- Sekve publikigi la programon en Google Play kaj reklami, samtempe petante pri opinioj
- Sekve surbaze de opinioj, laŭnecese modifi la priskribon kaj la programon mem ene de unu monato.
- Serĉi programisto(j)n kiu(j) kreos ĝin por aliaj poŝtelefonaj platformoj.
- Krei la programon por aliaj poŝtelefonaj platformoj kaj publikigi.

Atendataj rezultoj

Pli rapida kaj direkta transdono de informoj de TEJO al interesiĝantoj. Havi belan aplikaĵon tiel ke la komencantoj povos havi pli da utilaj informoj pri la junulara movado.

3.2.4. Faka agado - havi pli da fakaj sekcioj kaj por tio krei ŝablonon de regularo por faka sekcio, helpi por krei fakajn sekciojn

Priskribo

Faka interesiĝo en la junulara movado multas, sed ne estas tre bone organizita, do indas kunligi la simulfakemajn junulojn por tiel provizi al ili spacon facile trovi similan animajn junulojn. Tiun celon servas fakaj sekcioj de TEJO.

Agadoj

- Krei ŝablonon de regularo por faka sekcio kaj publikigi ĝin ĝis fino de marto 2016.
- Aktive puŝi por kreado de fakaj sekcioj.

Atendataj rezultoj

- Kresko je unu faka sekcio jare.
- Pli vigla faka junulara movado.

3.3. Igi la komunuman agadon de TEJO pli interaga

3.3.1. Strukturigi agadon de TEJO en sociaj retejoj kiel Facebook aŭ Twitter

Priskribo

Sociretaj iloj de TEJO daŭre estu regule aktivaj kun la celo engaĝi la membrojn de TEJO kun iliaj opinioj, komentoj, ideoj kaj agado. Anstataŭ uzi la sociretajn ilojn nur kiel informilojn, uzi ilin ankaŭ kiel aginstigilojn.

Agadoj

- Sociajn retojn kiel disvastigon de novaĵoj uzi nur post kiam la novaĵo aperu en la repaĝo de TEJO. Krome uzi ilin ankaŭ kiel disvastigilojn de novaĵoj liverataj de landaj sekcioj.
- En sociaj retoj regule enketi, demandi opiniojn de la membroj, instigi diskutojn, respondi al kritikoj, demandi helpon kaj aktivigi.
- Ĝis marto 2015 starigi kunordigilojn (ekzemple trello-tabulojn) por socireta komunikado.

Atendataj rezultoj

- Transdonante la informojn pri la agado de landaj sekcioj, oni kreas bonajn rilatojn kun la LS-j kaj instigas ili re-disvastigi informojn de TEJO.
- Se oni disvastigas novaĵojn kiuj unue aperas en tejo.org oni instigas homojn klaki al la nova repaĝo kaj malkovri utilajn informojn kiujn ĝi enhavas.

3.3.2. Instigi menciigon de TEJO en nova Lernu!-kurso kaj krei ligeblojn al TEJO de Lernu!

Priskribo

Prizorgi ke en la repaĝo de lernu.net kaj en aŭtomataj retmesaĝoj de Lernu! al ĝiaj uzantoj aperu en taŭgaj lokoj ligiloj kaj/aŭ reklambutonoj por gvidi uzantojn al la paĝo de TEJO, IJK aŭ aliaj repaĝoj kiuj rilatas al la agado de TEJO.

Agadoj

- Kontakti administrantojn de Lernu! por esplori ilian sintenon al la propono kaj havi proksimuman ideon pri la ebloj, ĝis septembro 2015.
- Esplori kunlabore kun Lernu!-teamo la konkretaj lokoj kaj manieroj kie kaj kiam aperu ligilo aŭ reklambutono de TEJO, ĝis oktobro 2015.
- Ekshavi la ligilojn kaj reklambutonojn laŭ kune farita plano, ĝis decembro 2015.
- Postsekvi la rezultojn, rigardi ĉu novaj membroj de TEJO trovis nin tra Lernu!, ĝis fino de 2016.
- Aktivi en la forumo de Lernu! informante pri la agado de TEJO kaj diskutigante pri ĝi.

Atendataj rezultoj

Kiam uzantoj kaj kursanoj de Lernu! plurfoje vidos TEJO-n kaj la agadon de TEJO por la e-movado, ili pli serioze konsideros membriĝi aŭ kunagadi en TEJO. Tio eventuale gvidos al kresko de la membronombro kaj aktiveco de TEJO.

3.3.3. Informado ene de TEJO

Priskribo

Havi en nia revuo Kontakto ĉiunumere artikolon/paĝon kiu resumas la agadon en la komisionoj.

Agadoj

- Interkonsenti kun la redaktoroj pri la formo de raportoj, havebla spaco, limdatoj, ĝis marto 2016.
- Peti al gvidantoj de komisionoj kaj/aŭ respondecata estrarano, raportoj ĉiunumere laŭ la ellaborita skemo kaj antaŭ fiksita limdato, ĉiunumate ekde marto 2016.

Atendataj rezultoj

Pli strukturita informfluo pri la agado de la komisionoj al niaj membroj, ĉiuj aktivuloj, niaj patronoj kaj aliaj interesitoj. Tiel ili sentos sin pli ligita al TEJO kaj ĝia agado, por ke ili pli fidele restu membroj/subtenantoj, pli facile mem agademiĝos, aŭ pli sukcese povos al konatuloj entuziasmige paroli pri TEJO.

3.3.4. Pasporta Servo

Priskribo

Pasporta Servo havu bone funkciantan retpaĝon kaj libroforme ĝi estu eldonata en dujara ritmo. La uzantaro de Pasporta Servo ricevu la rimedojn por bone esprimi siajn bezonojn, kiujn TEJO klopodu laŭpove plenumi.

Agadoj

- Post aperigo de la unua versio de nova Pasporta Servo informi la membrojn pri la lanĉo (kaj neceso aktualigi datumojn) kaj organizi kampanjon por varbi novajn membrojn al la servo.

- Pretigi la retpaĝon de Pasporta Servo, tiel, ke krom sia reta funkciado ĝi certigu facilan kreadon de la papera eldono.
- Eldoni papere Pasportan Servon en la dujara ritmo, do la libroforma Pasporta Servo pretu en la unua duono de 2016.
- Proponi al la uzantaro de Pasporta Servo organiziĝi forme de faka sekcio de TEJO, por tiel ebligi al ĝi pli bone esprimi la opinion kaj bezonojn de la uzantoj, plej malfrue en la unua duono de 2016.

Atendataj rezultoj

Kontenta kaj kreskanta (je almenaŭ 20% ĝis 2017 kaj sekve je almenaŭ 5% jare) membraro de Pasporta Servo.

AGADKAMPO 4: KUNORDIGO

4.1. Havi efikan scitransdonon kaj daŭripovan mastrumadon

Priskribo

Havi efikan scitransdonon kaj daŭripovan mastrumadon por la komitato, estraro, komisionoj kaj aliaj aktivuloj de TEJO.

Agadoj

- Krei unu ordigitan retan dokumentujon kun alirrajtoj taŭgaj por diversaj roloj ĝis decembro 2015 kaj verki instrukcion por aktivuloj kiel taŭge uzi la dokumentujon.
- Komitato
En la jam ekzistanta reta trejnado por la komitatanoj estu aldonita grupa laboro, por tiel pliproksimigi komitatanojn unu al la alia. Ĝin oni elprovu ĝis septembro 2015 kaj plibonigu ĝin laŭ la pritaksoj ĝis novembro 2015.
- Estraro
La nova estraro ricevu proksimume unu-semajnan trejnadon pri gvidado de junulara organizo (teamlaboro, gvidado, projektmastrumado) ene de du monatoj post la elektoj. Ĝis marto 2017 krei laborgrupon preparantan la trejnadon por sekva estraro.
- Komisionoj
Krei klaran respondec- kaj kunlaborstrukturon en kiu ĉiu komisiono havu respondecan estraranon kaj komisiiton ĝis marto 2015. Ĉefan rolon en gvidado de la komisiono havu unuavice la komisiito dum respondeca estrarano estu superrigardanto kaj kunliganto kun la aliaj estraraj kampoj. Se ne estas komisiito, estrarano plenumas tiun rolon. Ĝis marto 2015 krei tian internan informstrukturon, ke la komisiitoj havu taŭgan nivelon de ricevataj informoj.
- Krei laborgrupon por analizi la variantojn por plia profesiiĝo de TEJO-mastrumado ĝis aŭgusto 2015. Prepari analizon pri tio kiel eblus atingi plian profesiiĝon de TEJO-mastrumado ĝis oktobro 2015. En la analizo oni konsideru diversajn variantojn (pliaj volontuloj, pliaj oficistoj, parte profesiaj estraranoj; loko de ilia laboro), ties avantaĝojn, malavantaĝojn kaj financajn konsekvencojn. Sekve de la analizo prezentu al la komitato raporton pri plia profesiiĝo de TEJO-mastrumado kun rekomendo pri la plej taŭga(j) solvo(j) en novembro 2015. Sekve, en decembro 2015 okazigo de komitata voĉdono pri la solvo(j) prezentita(j) en la raporto por efektivigi la solvon ekde januaro 2016. Efektivigi la alprenitan decidon pri plia profesiiĝo de TEJO-mastrumado ĝis januaro 2016.

Atendataj rezultoj

Klara agadstrukturo de TEJO en kiu ĉiu scias kaj respektas sian rolon, taskojn, respondecojn kaj rajtojn; havas aliron al ĉiuj bezonataj dokumentoj kaj materialoj; ricevas trejnadon je komenco de sia aktivado en koncerna kampo kaj scias al kiu sin turni kun pliaj demandoj kaze de bezono.

4.2. Havi kreskantan aktivularon de TEJO

4.2.1. Kreskigi nombron de aktivuloj en komisionoj almenaŭ ĝis 200

Priskribo

Kreskigi la kvanton de homoj kiuj aktivas en la komisionoj de TEJO tiel ke TEJO havu sufiĉe da aktivuloj por realigi sian laborplanon kaj pli da homoj estu aktive engaĝitaj en TEJO-agadoj.

Agadoj

- Regule okazigi varbadon por la komisionoj - rekte al la membroj de TEJO, tra la kanaloj de TEJO, kun peto plusendi al aliaj personoj - ĉiun trian monaton por malpli aktivaj komisionoj kaj por la aktivaj almenaŭ dufoje jare. La varbado enhavu celojn de la komisionoj kaj informojn pri ilia aktuala agado.
- Komisiitoj aktive gvidu kaj atentu pri la evoluo de la komisionoj. Ili superrigardu, ke komisionanoj havas taskojn kaj havas influon al tio, kion ili emas realigi. Se la komisiono senkiale ne aktivas dum pli ol monato oni serĉu novan komisiiton.
- En la komisionoj de tempo al tempo memori pri la ebleco individue membriĝi en TEJO.

Atendataj rezultoj

- Efektiva realigo de 80% de la laborplano.
- 20-procenta kresko de individua membreco inter la aktivuloj.

4.2.2. Nombri funkciantajn universitatajn Esperanto-grupojn kaj sekve kreskigi la nombron je 20%

Priskribo

Kreado je universitataj esperanto-grupoj por esperantigi pli facile studentojn, ricevi subtenojn de la universitato kaj pledi por agnoskata instruado de Esperanto en universitatoj.

Agadoj

- Fari prelegojn en universitatoj, sukcesrakontojn (ankaŭ menciante malfacilaĵojn) publikigi regule, disvastigi por tiel kreskigi la emon kaj la scion por sukcese reprodukti ĝin surloke. Unua artikolo: septembro 2015. Organizi la akiritajn konojn, la (mal)sukcesojn de diversaj temoj tiel, ke ĝi estu alirebla al novuloj.
- Krei ŝablonartikolojn tradukeblajn, adapteblajn kaj publikigeblajn en universitata (ret)gazeto. La rakontojn pri la sukcesaj publikigoj disvastigi cele al almenaŭ unu rakonto monate averaĝe ekde oktobro 2015.
- Organizi en universitatoj konferencojn, kiuj donas ECTS-poentojn (aŭ ekvivalentajn).
- Kolekti informojn pri la jam funkciantaj universitataj Esperantogrupoj ĝis oktobro 2015. Peti ilin sendi rakontojn, enskribiĝi ĉe edukado.net ĝis novembro 2015.
- Krei priskribojn pri kiel krei universitatajn grupojn ĝis februaro 2016.
- Kunligi jam sukcesajn gvidantojn kun novuloj laŭbezzone.
- Krei komunumon de universitataj Esperanto-grupoj ĝis aprilo 2016.
- Varbi ĉiudumonate tra la kanaloj de TEJO kaj LS-j pri la ekzisto de tiaj grupoj.

- Varbi regule pri la graveco de la kreado de tiaj grupoj, kaj pri la disponeblaj helpoj ĉiudumonate post la ekzisto de la helpiloj.
- Pligrandigi la monan bazon de Fonduso Trampolino por povi kaze de bezono subvencii tian agadon.
- Aranĝi kurson de Esperanto en universitatoj, ĉu en la oficiala programo ĉu kiel aparta agnoskata ECTS-poentdona.

Atendataj rezultoj

- Kresko de nombro de universitataj Esperanto-grupoj je 20%.
- Studenta faka sekcio de TEJO.
- Unu kroma universitato jare kun oficiala ECTS-poentdona kurso de esperanto.

4.2.3. Nombri funkciantajn junularajn lokajn Esperanto-grupojn kaj sekve kreskigi la nombron je 20%

Priskribo

Por havi viglan junularan movadon indas havi funkciantajn junularajn lokajn grupojn tra la mondo. Por koni la situacion, indas ilin unue nombri, analizi la kialojn de ilia ekzisto, eltrovi kiel eblus ilian situacion plibonigi, kaj poste instigi junulojn krei siajn proprajn junularajn grupojn.

Agadoj

- Nombri la junularajn Esperanto-grupojn kaj kursojn kie oni Esperanton instruas al junuloj ĝis januaro 2016, por la nombrado uzu la helpon de edukado.net kaj instigu la klasojn registriĝi ĉe edukado.net se ne jam faris, aldone dum aranĝoj varbu pri la nombrado kaj tra la kutimaj kanaloj de TEJO.
- Dum la nombrado komenci intervui la grupojn pri iliaj malfacilaĵoj, bezonataĵoj, peti de ili anekdotojn, rakontojn. Publikigi la intervjuojn tiel, ke estu almenaŭ 10 intervjuoj jare.
- Krei priskribojn pri kiel krei junularajn lokajn grupojn ĝis februaro 2016.
- Kunligi jam sukcesajn gvidantojn kun novaj gvida/ontoj ekde februaro 2016.
- Disponigi retan trejnadon por la lokaj grupoj - ĝis junio 2016.
- Instigi junulojn krei siajn lokajn grupojn kun la celo atingi la kreskon je 20%.
- Krei komunumon de junularaj lokaj Esperantogrupoj.
- Varbi ĉiudumonate tra la kanaloj de TEJO kaj LS-j pri la ekzisto de tiaj grupoj.
- Varbi regule pri la graveco de la kreado de tiaj grupoj, kaj pri la disponeblaj helpoj ĉiudumonate post la ekzisto de la helpiloj.
- Pligrandigi la monan bazon de Fonduso Trampolino por povi kaze de bezono subvencii tian agadon, tuj.

Atendataj rezultoj

- Kresko de nombro de junularaj Esperanto-grupoj je 20%.
- Ĝisdata listo de junularaj grupoj.
- Kunlaboro de TEJO kun junularaj grupoj por eksterrilataj celoj aŭ por fondado de LS.
- Kunlaboraj projektoj inter lokaj grupoj (ekz. grupaj kulturinterŝanĝoj).

4.3. Havi pli koheran administradon en TEJO

4.3.1. Havigi al LS-j mastrumadsistemon pri siaj membroj

Priskribo

Provizi administran membromastruman sistemon al landaj sekcioj kiuj ne havas jam propran aŭ kiuj tamen volonte transiras al pli faciluzebla sistemo.

Agadoj

- Kolekti sistemojn uzataj de landaj sekcioj ĝis aprilo 2015.
- Ekscii de E@I kiel status ĉitema projekto de ili.
- Kolekti sistemojn uzatajn de almenaŭ 10 aliaj junularaj neregistaraj organizoj ĝis aprilo 2015.
- Kolekti informojn pri aliaj eblaj ekzistantaj mastrumadsistemoj de membroj por ne registaraj organizoj ĝis aprilo 2015.
- Kompari solvojn kaj surbaze de tio krei demandaron al LS-j pri kiajn sistemon ili bezonas ĝis junio 2015.
- Elekti unu kaj trovi provuzanton ĝis septembro 2015 (aŭ du, se aperos malsamaj bezonoj ekz. depende de LS-grandeco).
- Peti raporton unu monaton poste.
- Verki helpilon kaj varbi por uzantoj ĝis decembro 2015.
- Ricevi/kolekti rimarkojn kaj plibonigi ĝis marto 2016.

Atendataj rezultoj

Post unu jaro ekzistu rekomendata de TEJO maniero por mastrumi membrojn de LS-j.

4.3.2. Membroj de LS-j iĝu konsciaj membroj de TEJO

Priskribo

Membroj de LS-j ofte tute ne konscias ke ili membras en TEJO. Necesas plibonigi komunikadon kun ili kaj konsciigi pri eblecoj aktivi en TEJO.

Agadoj

- Pli forte, pozitive informi pri TEJO por ke estu aŭtomata penso ke se mi estas juna Esperantisto - mi estas membro de TEJO. En la komunikadmaniero estu pli forte emfazita ke ankaŭ la membroj de LS-j estas membroj de TEJO.
- Regule rekte rilati kun la individuaj membroj, ofertante al ili partoprenon je trejnadaj, reprezentadobloj, valorajn informojn.
- Solvi la problemon pri komunikado kun LS-membroj - ellabori sistemon por ke ili regule ricevu pli da informoj ol nur tra sia komitatano kaj fejsbuka paĝo aŭ certiĝi, ke almenaŭ unu el du fajne funkcias.
- Zorgigi LS-estarojn pri la problemoj kaj instigi ilin pli konsciigi siajn membrojn pri ilia membreco en TEJO.

- Ellabori kun LS-j manierojn instigi iliajn membrojn individue membriĝi en TEJO (ekzemple per kombinaj membreckategorioj en LS-j) kaj sekve proponi tiujn manierojn al ĉiuj LS-j.
- Okazigi laborgrupon dum IJK 2015 kiu (plivastigite je tiuj, kiuj ne povis ĉeesti IJK-n) daŭrigu sian laboron ankaŭ post ĝi kaj prezentu rezulton ĝis fino de septembro 2015.
- En oktobro 2015 dissendi la proponon al LS-j kun peto enkonduki ĝis fino de 2015 kadre de varbado al membrecoj por 2016.

Atendataj rezultoj

Membroj de LS-j estu konsciaj, ke ili membras en TEJO kaj kunkreas ĝin. Ili ankaŭ komprenu kial indas individue membriĝi en TEJO, aktiviĝi en ĝi kaj sciu kiel tion facile fari.

4.3.3. Projektbazita subtenpetado inter Esperantistoj

Priskribo

TEJO havas tre subtenindan agadon, kio plej efike montreblas tra la projektoj, ankaŭ ĉar homoj ŝatas subteni konkretaĵojn.

Agadoj

- Plani ĉiujare kelkajn kampanjojn por varbi por donacoj por taŭgaj, konkretegaj celoj.

Atendataj rezultoj

Krom la eblo akiri donacojn, la kampanjoj pli konsciigos homojn pri tio, kion faras TEJO kaj kion ĝi volus fari se estus sufiĉaj monrimedoj.

LISTO DE MALLONGIGOJ

Jen la listo de la mallongigoj kaj akronimoj uzataj en la laborplano kun iliaj respektivaj signifoj.

ECTS Eŭropa Poento-Transfera Sistemo (*angle: European Credit Transfer System*)

E@I Edukado@Interreto

IJK Internacia Junulara Kongreso

ILEI Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

LS Landa Sekcio

TEJO Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

UEA Universala Esperanto-Asocio